

Esperanto - La Bitbulteno 94

esperanto.es

APÚNTATE AL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO EN MEJORES CONDICIONES

A finales de junio termina un nuevo plazo para apuntarse con cuota reducida al 82º Congreso Español de Esperanto, que este año tendrá lugar en la localidad valenciana de Cheste, en el [complejo educativo](#) (la antigua Universidad Laboral), del 5 al 8 de septiembre.

Importante: es muy recomendable apuntarse lo antes posible, para asegurarse el alojamiento en el propio Complejo Educativo, donde será posible comer y dormir durante el congreso [con precios muy atractivos](#). Por razones organizativas de la institución, no se garantiza el alojamiento a partir del 10 de julio. Existe además un hotel cercano, [Hotel Torrijos](#), que ofrece un [precio especial para congresistas](#), pero solo hasta el 9 de agosto.

El programa provisional estará disponible dentro de unos días, pero podemos asegurar que estará lleno de actividades lúdicas y culturales. Podemos confirmar ya que habrá una recepción oficial del Ayuntamiento: hay que recordar que Cheste tiene una gran relación con el esperanto, con calles y un mural dedicados a esperantistas locales.

Además, sobre todo para visitantes procedentes de lugares lejanos, está previsto un muy amplio programa post-congresual, con visitas a la región valenciana, guiadas por esperantistas locales. Se han organizado sesiones informativas todos los sábados, por Zoom; consulta en [EventaServo](#).

Puedes ver los detalles prácticos, incluyendo cómo llegar, en [la página web del Congreso](#), donde también puedes [inscribirte](#). ¡No lo dejes para el final!



NUEVO LIBRO EDITADO POR IZQUIERDA Y ESPERANTO SATeH

A finales de mayo ha aparecido un nuevo libro publicado por la asociación ["Izquierda y Esperanto SAT-en-Hispanio"](#), titulado "Volontuloj kun okulvitroj" ("Voluntarios con gafas)", que trata sobre la participación de voluntarios extranjeros durante la Guerra Civil Española. El libro se compone principalmente de dos obras, de carácter autobiográfico, que relatan las vivencias de dos de esos visitantes, intelectuales reconocidos en sus países, además de otros textos explicativos.

La primera obra del volumen es en realidad una reedición: "La tragedia española", del escritor

holandés [Jef Last](#), que cuenta sus experiencias como voluntario. Se publicó por primera vez durante la guerra y se tradujo al esperanto ya en 1938. Es interesante comentar que el libro no tiene edición en español.

El segundo es "Verano español" del escritor noruego [Nordahl Grieg](#). Fue publicado en 1937, inmediatamente después del regreso del escritor de España a su país, como una colección de crónicas sobre su participación como periodista, y recién ahora traducido al esperanto (en español fue [editado](#) en el 2017).

Además, el libro contiene un epílogo, escrito por Toño del Barrio, con información básica sobre la guerra, sobre el papel de intelectuales y escritores en ella, sobre el Congreso Internacional de Escritores para la Defensa de la Cultura en el que ambos escritores participaron en 1937 y sobre el uso del esperanto durante la guerra española. También es posible leer una breve biografía de ambos autores.

El libro se puede adquirir ya en el Servicio de Libros del SATeH. Mira los detalles en [su sitio web](#). El precio es de 15 euros.



NUEVO LIBRO DE MIGUEL FERNÁNDEZ

La editorial Lastura anunció la publicación de un nuevo libro de Miguel Fernández, con el título "La palabra y el viento". Aunque en español, el libro se presenta como un producto de la literatura esperantista: se trata de cinco cuentos de "La vorto kaj la vento", libro original en esperanto editado por [Mondial](#).

El libro está disponible en librerías desde mayo. También es posible comprarlo en [la web de Lastura](#), donde podrás leer más detalles.

También puedes saber más por medio de la entrevista que el también poeta Armando Silles le hizo a Miguel el 31 de mayo en el programa "Olvida tu equipaje", que conduce todos los viernes en Radio Utopía, Se puede escuchar en forma de podcast en [este enlace](#).

EN LA FERIA DEL LIBRO DE MADRID

Dos autores esperantistas participaron en la Feria del Libro de Madrid que tuvo lugar en junio en el Parque del Retiro de Madrid.

Miguel Fernández firmó ejemplares del libro mencionado previamente, "La palabra y el viento", en la caseta de la editorial Lastura el 1 de junio. El éxito fue tal que se agotaron todos los libros que la editorial había llevado, y se le pidió repetir la firma el día 13, con un resultado similar.

También Jorge Camacho participó en la Feria con el mismo éxito. El mismo día 1 firmó ejemplares de su libro "Palestina estrangulada" (que también tiene una versión esperanto, con el título "[Palestino strangolata](#)"), en la caseta de la librería Diwan, y de nuevo el día 11 en la librería Balqís, de la Casa Árabe.



VISITA A LA FUNDACIÓN VICENTE RISCO

El director de la Fundación Esperanto, José Antonio del Barrio, visitó en abril la sede de la [Fundación Vicente Risco](#) en Allariz (provincia de Ourense) y se reunió con su presidente y su secretario, para estudiar las antiguas relaciones de Risco con el esperanto. Vicente Risco fue uno de los intelectuales más importantes de la primera mitad del siglo pasado en Galicia, y uno de los padres del nacionalismo gallego. En la sede de dicha fundación se conserva un ejemplar del Fundamento del Esperanto publicado en 1906 y unas notas manuscritas del propio Risco, de las que se desprende que estudió el idioma. Se sabe también que mantuvo estrechas relaciones con los principales esperantistas de su época en Ourense.

En el próximo número de la revista "Boletín" de HEF aparecerá un artículo más amplio sobre la relación de Risco con el esperanto.



HOMENAJE A LORCA EN SEGOVIA

El sábado 25 de mayo el Foro Social de Segovia organizó un homenaje a Federico García Lorca, al que, entre otros, estuvo invitado Miguel Fernández como traductor de Lorca al esperanto y como escritor en esta lengua. También estuvo presente el secretario de la Federación Española de Esperanto, Manolo Parra, originario de Segovia (casualmente, el presidente de esa asociación Foro Social es el yerno de César de Mosteyrín, antiguo activista esperantista en Segovia y profesor de Manolo).

El homenaje a Lorca tuvo lugar en una antigua iglesia, San Quirce, transformada en centro cultural. Los discursos, incluido el de Miguel, se pronunciaron desde el antiguo púlpito (ver foto en la parte en esperanto). Además, se proyectó un vídeo enviado por otro conocido esperantista, David Galadí, como familiar de uno de los dos banderilleros anarquistas asesinados y

enterrados con Federico.

En la web de la asociaci3n aparece un [reportaje del evento](#), con fotografias adicionales.

ARTÍCULO SOBRE LA BIBLIOTECA DE HEF

En junio la web cultural Alquibla ha publicado un detallado art3culo sobre la Biblioteca Juan R3gulo P3rez de la Federaci3n Espa3ola de Esperanto. Lo puedes leer en abierto en [su p3gina web](#).



CANAL EN WHATSAPP

Para estar informado de novedades e iniciativas en el mundo del esperanto, y para disfrutar de nuevos elementos culturales en nuestra lengua, se ha abierto un nuevo medio de comunicaci3n: un canal "Esperanto" en WhatsApp. Puedes seguirlo clicando en este enlace: <https://whatsapp.com/channel/0029VafOLdoKGGG9k4T16m3N>
Es gratuito, serio y no intrusivo.

←  Esperanto
59 seguidores

La abeloj kaj la nevidebla de Clemens J. Setz (2020)
Esperanto-traduko: Detlef Karthaus (2023)

Impona verko pri diversaj planlingvaj projektoj kaj iliaj poetoj kaj poezio, i.a. pri Esperanto. Kun kelkaj ilustraĵoj. 9:08

→

Mia Amo Restis For - La Verda Stel' | Kanto kun teksto
La Verda Stel' estas mistera muzikgrupo. La kanalo kiu, e
youtu.be

VERANO DE CONGRESOS DE ESPERANTO

Como ya informamos en anteriores boletines, este verano va a ser posible disfrutar de encuentros de esperanto en cualquier lugar del mundo. Brevemente, algunos ejemplos:

2024 será el año del primer Congreso Universal de Esperanto en África, concretamente en Arusha, en Tanzania, del 3 al 10 de agosto. Más informaciones en la web: <https://uk.esperanto.net/2024/>.

El [80 Congreso Internacional de Jóvenes Esperantistas](#) tendrá lugar en Lituania, entre el 18 y el 25 de agosto.

El [Congreso de la Liga de Profesores Esperantistas](#) tendrá lugar en América, en concreto en Maceió (Brasil), entre el 20 y el 27 de julio.

El [congreso de Sennacieca Asocio Tutmonda](#) (SAT, la Asociación Anacional Mundial) tendrá lugar en Oporto del 5 al 11 de agosto.

Y, sobre todo, no os olvidéis del Congreso español, en Cheste, en el que ya [se han apuntado](#) esperantistas de una veintena de países.

Para saber más informaciones sobre estos y otros encuentros de esperanto, visita de vez en cuando la web <https://eventaservo.org/>.



ASAMBLEA GENERAL DE LA FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Durante el Congreso de Cheste en septiembre tendrá lugar la asamblea general ordinaria de la Federación Española de Esperanto. Los miembros de la asociación recibirán la convocatoria por medio del Boletín, pero os animamos a venir también para hablar del futuro y los planes de la asociación.

Recordamos que este año corresponde renovar la directiva de la asociación. Cualquier socio puede ser candidato a miembro de la directiva, y te animamos a que te lo plantees. Contacta con la actual Directiva, si tienes cualquier duda.

Y si aún no eres miembro, pues ya sabes, ámate: <http://www.esperanto.es/inscripcion>





FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

ALIĜU FAVORPREZE AL LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Fine de junio venas nova limdato por aliĝi kun reduktita kotizo al la 82-a Hispana Esperanto-Kongreso, kiu ĉi-jare okazos en la apudvalencia urbo Cheste, en la granda [Eduka Komplekso](#) (iam nomata *Universidad Laboral*), de la 5a ĝis la 8a de septembro.

Grave: oni rekomendas aliĝi kiel eble plej baldaŭ, por certigi loĝadon en la Eduka Komplekso mem, kie eblos manĝi kaj dormi dum la kongreso [je tre allogaj prezoj](#). Pro organizaj kialoj de la institucio, loĝado ne estas garantiata post la 10a de julio. Ankaŭ ekzistas proksima hotelo, [Hotelo Torrijos](#), kiu proponas [specialan prezon por kongresanoj](#), sed nur ĝis la 9a de aŭgusto.

La provizora programo estos disponebla post kelkaj tagoj, sed ni jam povas certigi, ke ĝi estos plena de distraj kaj kulturaj agadoj. Ni povas nun konfirmi, ke estos oficiala akcepto de la Urbodomo: oni devas memori, ke Cheste havas grandan rilaton kun Esperanto, kun stratoj kaj murpentraĵo dediĉitaj al lokaj esperantistoj.

Krome, precipe por vizitantoj el malproksimaj lokoj, estas planata tre ampleksa postkongresa programo, kun vizitoj al la Valenciana regiono, gvidataj de lokaj esperantistoj. Oni organizis informajn sesiojn la sabatojn, per Zomo: ili estas anoncigitaj per [EventaServo](#).

Vi povas vidi praktikajn detalojn, inkluzive de kiel alveni tien, en la [retejo de la Kongreso](#), kie vi ankaŭ povas [aliĝi](#). Ne lasu ĝin por la lasta momento!



NOVA LIBRO ELDONITA DE SAT-EN-HISPANIO


Fine de majo aperis nova libro eldonita de [SAT-en-Hispanio](#), titolita “Volontuloj kun okulvitroj”, kiu temas pri partopreno de eksterhispaniaj volontuloj dum la Hispana Enlanda Milito. La libro konsistas ĉefe el du verkoj, membiografiaj, kiuj rakontas la spertojn de du tiaj vizitantoj, plus aliaj klarigaj tekstoj.

La unua verko de la volumo estas fakte reeldono: “La hispana tragedio”, de la nederlanda verkisto [Jef Last](#), kiu rakontas siajn spertojn kiel volontula batalanto. Ĝi estis unue eldonita dum la milito, kaj tradukita al Esperanto jam en 1938.

La dua estas “Hispana somero” de la norvega verkisto [Nordahl Grieg](#). Ĝi estis publikigita en 1937, tuj post la reveno de la verkisto el Hispanio al sia lando, kiel kolekto de kronikoj pri lia partopreno kiel ĵurnalisto, kaj nur nun tradukita al Esperanto.

Krome, la libro entenas epilogon, verkitan de Toño del Barrio, kun bazaj informoj pri la milito, pri la rolo de eksterhispaniaj volontuloj, kaj aparte la intelektuloj, pri la Internacia Kongreso de Verkistoj por Defendo de la Kulturo kiun ambaŭ aŭtoroj partoprenis en 1937 kaj pri la uzo de Esperanto dum tiu hispana milito. Ankaŭ eblas legi mallongan biografion de ambaŭ aŭtoroj.

La libro estas aĉetebla en la Libroservo de SATeH (kaj baldaŭ en aliaj libroservoj). Rigardu la detalojn en [ties retejo](#). La prezo estas 15 eŭroj.



NOVA LIBRO DE MIGUEL FERNÁNDEZ

La eldonejo Lastura anoncis la aperon de nova libro de Miguel Fernández, kun titolo “La palabra y el viento”. Kvankam en la hispana, la libro estas prezentata kiel produkto de la Esperanto-literaturo: temas pri kvin noveloj el “La vorto kaj la vento”, publikigita en Esperanto de [Eldonejo Mondial](#).

La libro estas akirebla en la librovendejoj jam ekde majo. Ankaŭ eblas ĝin aĉeti en [la retejo de Lastura](#), kie oni povas legi pliajn detalojn.

Krome, vi povas koni pliajn detalojn pere de la intervjuo kiun la poeto Armando Silles faris al Miguel en la programo “Olvida tu equipaje” (Forgesu vian bagaĝon), kiun li gvidas ĉiuvendrede ĉe la madrida Radio Utopía (Radio Utopio), Ĝi estas aŭskultebla en podkasta formo en [tiu ĉi ligilo](#) (hispanlingve).




EN LA LIBROFOIRO DE MADRIDO

Du Esperantaj aŭtoroj partoprenis en la Madrida Librofoiro kiu okazis en la madrida Parko Retiro komence de junio.

Miguel Fernández subskribis la 1-an de junio ĉe la stando de la eldonejo Lastura ekzemplerojn de la menciita libro "La vorto kaj la vento". La sukceso estis tia, ke ĉiuj libroj, kiujn la eldonejo portis, estis elĉerpitaj, kaj li estis petita ripeti ĝin la 13-an, kun similaj rezultoj.

Ankaŭ Jorge Camacho partoprenis la Foiron kun sama sukceso. En la sama tago, la 1-an, li subskribis ekzemplerojn de sia libro "Palestina estrangulada" (kiu ankaŭ havas Esperantan version, kun la titolo ["Palestino strangolata"](#)), ĉe la librovendejo Diwan, kaj denove la 11-an ĉe la librovendejo Balqís. de la kulturinstitucio Araba Domo.





VIZITO AL LA FONDAĴO VICENTE RISCO

En aprilo, la direktoro de la Fondaĵo Esperanto, José Antonio del Barrio, vizitis la sidejon de la [Fondaĵo Vicente Risco](#) en Allariz (provinco Oŭrenso, Galegio) kaj renkontiĝis kun ties prezidanto kaj sekretario, por studi la iamajn rilatojn de Risco kun Esperanto. Vicente Risco estis unu el la plej gravaj intelektuloj de la unua duono de la pasinta jarcento en Galegio, kaj unu el la patroj de la galega naciismo. En la sidejo de tiu fondaĵo konserviĝas ekzemplero de la Fundamento de Esperanto eldonita en 1906 (vidu foton sube) kaj notoj faritaj de Risco mem, en kiu evidentiĝas ke li studis la lingvon. Li havis proksimajn rilatojn kun la ĉefaj esperantistoj de sia tempo en Oŭrenso.

Pri tiuj rilatoj de Risco kun Esperanto aperos artikolo en la venonta numero de la revuo "Boletín" de la HEF.



OMAĜO AL LORCA EN SEGOVIO

La sabaton 25-an de majo la t.n. Foro Social de Segovia aranĝis omaĝon al Federico García Lorca, al kiu, inter aliaj, estis invitita Miguel Fernández kiel tradukanto de Lorca en la lingvon Esperanto kaj kiel E-verkisto. Ĉeestis ankaŭ la origine segoviano Manolo Parra, sekretario de HEF (koincide, la prezidanto de tiu asocio Foro Social estas bofilo de César de Mosteyrín, iama esperantista aktivulo en Segovio kaj instruisto de Manolo).

La omaĝo al Lorca havis lokon en antikva preĝejo, San Quirce, transformita en kulturejon. La paroladoj, inklude de tiu de Miguel, fariĝis de sur la eksa predikejo (vidu foton). Krome, oni projekciis videaĵon senditan de alia konata esperantisto, David Galadí, kiel familiano de unu el la du anarkiismaj banderilistoj pafmortigitaj kaj enterigitaj kun Federico.

Raporto pri la evento, kun pliaj fotoj, aperas en la [retejo de la asocio](#).






ARTIKOLO PRI LA BIBLIOTEKO DE HEF

En junio la kultura retejo Alquibla publikigis detalan artikolon pri Biblioteko Juan Régulo Pérez de Hispana Esperanto-Federacio. Vi povas legi ĝin en [ĝia retejo](#).



ESPERANTO-KANALO EN WHATSAPP

Por esti informita pri novaĵoj kaj kulturaj iniciatoj en Esperanto, vi povas aliĝi al la nova kanalo malfermita en la apo Ŭasapo (WhatsApp). Klaku simple en: <https://whatsapp.com/channel/0029VafOLdoKGGG9k4T16m3N>
Ĝi estas senpaga, serioza kaj ne altruda.





SOMERO DE ESPERANTO-KONGRESOJ

Kiel ni jam informis en pasintaj Bitbultenoj, en tiu ĉi somero eblos ĝui kongresojn en ajna parto de la mondo. Jen mallonge iujn ekzemplojn:

2024 estos la jaro de la unua Universala Kongreso en Afriko, konkrete en Aruŝo (Tanzanio), de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto. Eblas trovi pliajn informojn en <https://uk.esperanto.net/2024/>.

La [80-a Internacia Junulara Kongreso](#) de TEJO okazos en Litovio, inter la 18-a kaj la 25-a de aŭgusto.

La [kongreso de ILEI](#) (instruistoj) okazos en Ameriko, konkrete en Maceió (Brazilo), inter la 20a kaj la 27a de julio.

La [kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda](#) (SAT) okazos pli proksime, en Porto (Portugaliao), inter la 5a kaj 11a de aŭgusto.

Kaj ĉefe ne forgesu pri la hispana kongreso, kiu disvolviĝos en Cheste, en septembro, al kiu jam [aliĝis](#) esperantistoj el dudeko da landoj de la mondo.

Pri tiuj kaj multaj aliaj renkontoj kaj kunvenoj, vi trovos la detalojn en la retejo <https://eventaservo.org/>.



ĜENERALA KUNVENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Dum la Hispana Kongreso en Cheste, en septembro, okazos Ordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio. Oni publikigos la alvokon en la revuo Boletín, sed ni jam invitas vin veni, ankaŭ por paroli pri la estonto kaj la planoj de la asocio.

Ni memorigas ke ĉijare devas okazi la renovigo de la estraro de HEF. Ĉiu ano povas kandidati, kaj ni invitas vin pripensi vian eblan kunlaboron. Kontakti kun la nuna estraro se vi havas dubojn.

Kaj se vi ne estas ano de HEF, ni kompreneble invitas vin aliĝi, ĉe: <http://www.esperanto.es/inscripcion>



